

Eltuniziaj kronikoj (2)

Ĉe la koro de Tunizio, Thala la policejo okupaciita



La mortintoj pluivas je la popola koro

Thala, ĉe la provinco Kasserine, 300 km. disde la ĉefurbo. Malriĉa, margenigita, neindustria urbo, kies nursola rimedo estas la pluvdependa senirigacia agrikulturo: tritiko, figokaktoj...

Kiam ni alvenis, ni estis ŝokitaj de muzeo el grafitioplennaj muroj sub libera ĉielo. Postulantaj liberon kaj dignon, kontraŭ Ben Ali kaj ties perfortistoj, omaĝoj al la 6 mortintoj por la revolucio, fidelec-volo al ties memoro. Libera esprimo

de la popolo sur la muroj de tiu ĉi eta kaj forlasita urbo de la landinterno el Tunizio.

La junuloj ĉirkaŭas nin, kiam ni fotis la murskribaĵojn. Ili rakontas al ni la historion de sia lukto. Jam je la 24a de decembro ili faris sian unuan marŝon solidarecan kun Sidi Bouzid, per kiu oni postulis unuafoje ĉe la tuta Tunizio la faligon de Ben Ali. La 3an de januaro la lernantoj de la du mezlernejoj, ĉiu el ili el kontraŭaj urbo-ekstretoj, decidis surstratiĝi. La mezlernejestroj alvokis la patrojn, por ke ili malebligu al la lernantoj eliri surstrate. Inversan rezulton: la patroj kuniĝis al siaj filoj kaj la tuta urbo surstratiĝis per pacema manifestacio.

La malamata kolonelo Youssef Abdelaziz ordonis pafi sur la manifestaciantoj. Marouan Jemli, 19-jaraĝa, estis la unua martiro ĉe Thala. La batalo por ne perdi lian kadavron, ili timis, ke la polico malaperigu ĝin por kaŝi sian murdon, okazigis duan mortinton, ankaŭ 19-jaraĝa. Finfine la junuloj atingis porti la kadavron ĝis la domo de ties avino post dekhora marŝo tra montvojoj.

La enterigon de Marouan profitis la krima kolonelo Youssef por pafi sur tiuj, portantaj la ĉerkon. 32-ja-



Popola omaĝo al la martiroj de la revolucio



La okupaciita policejo

raĝa kamarado, kiu jam pretigis sian edziniĝon je marto, kaj handikapulo falis mortintaj apud la ĉerko sub la policaj kugloj, la lasta kun 5 kugloj je la korpo. La patrinoj klopodis kunporti la ĉerkon (je la islama kulturo estas la viroj, kiuj akompanas la mortintojn ĝis la tombejo), sed la junuloj estis decidintaj kunporti ĝin.

Inter la 3a kaj la 6a de januaro Thala, urbo kun 15.000 loĝantoj, estis plene sieĝata de 1.800 policanoj. Maleble en- aŭ eliri. Ili ĉesigis la provizon de akvo, pano kaj sukero. La

kriegoj oni aŭdis ĉe ĉiuj anguloj de Thala: “Jes al akvo kaj pano; sed NE al Ben Ali”. 150 arestitoj kaj multaj homoj estis turmentitaj kaj humiligitaj, junuloj, viroj kaj virinoj, neplenaĝuloj. Tamen per uzado de facebook kaj pliaj sociaj retoj la junuloj atingis disvastigi la filmojn pri la subpremado kaj diskonigi la murdon de la polico sur 5 el siaj junuloj kaj la polican sieĝon de la urbo.

La 8an de januaro la kolonelo Youssef estas senoficigita kaj anstataŭita per alia poliestro. Sed la movado ĝeneraliĝis sur la tuta Tunezio kaj la ribelo alvenas jam ĝis la ĉefurbo. La 12an de januaro plia homo estas murdita de la polico antaŭ sia domo. La nova poliestro -plia murdisto.

La ordono de la unuaj tagoj estis klara por la polico: fiaskigi la ribelon en Sidi Bouzid kaj Kasserine (provinco al kiu apartenas Thala) por eviti ties disvastigon sur la kroma Tunizio. La 1.800 policanoj, kiuj dum tagoj sieĝis ilin, havis klarajn ordonojn mortigi, disrompi ĉiurimede la reziston.

Thala, urbo sen polico kaj sen urbregistaro, memregita de la loĝantaro

Sed Thala, urbo kun revolucia tradicio, rezistis kaj venkis. Hodiaŭ ne estas polico ĉe la urbo. La junuloj prizorgas la sekurecon laŭvice. Nur la militista ĉeesto memorigas nin pri la ekzisto de la ŝtato.

La komitato pri savo de la revolucio administras la urbon kaj eltenas kiel unuan postulaĵon “justicon por niaj mortintoj”-n. Ili prezentis liston kun la homoj kulpantoj pri la murdoj, kun nomoj kaj familinomoj kaj dum 17 tagoj de la monato marto eltenis koncentriĝon por postuli la malliberigon kaj juĝon de la murdistoj. La ministrejo pri justico de la provizora registaro petis al ili 15-ta-



Je la muro de la policejo oni memoras la mortintojn



Policejo, nun socia kunvenejo

gan tempon por respondi. Okaze ke, dum la unua semajno de aprilo ne estus respondo, ili reekos la batalon.

Ili malagnoskas la prezidanton Fouad Mebazaa-n kaj la ĉefministron Béji Caid Sebsi-n. Ili postulas la disolviĝon de la tri kreitaj konsilioj: tiu pri la reformoj politikaj kaj konstituciaj, tiu pri la enketado pri la subpremo ekde la 17a de decembro kaj tiu pri la koruptado. Ili ne fidas ilin, ĉar ili estis kreataj de Ghanouchi kaj estas plenŝtopitaj per homoj el la RCD de Ben Ali. Ĉu eble ili enketos mem?

La policejo aliigita al socia kunvenejo

Post la morto de Marouan la kolero prenis liajn amikojn. Iu el ili plenigis sian motorciklon per benzino, ekbruligis kaj lanĉis ĝin kontraŭ la policejo, okazigante bruligon, kiu devigis la policon forlasi la urbon.

La 17an de februaro Nemri Bassen, mekanikista inĝeniero senlaborpostena ekde la 2004a, okupaciis la policejon kaj eltenas sin en ĝi postulante sian rajton pri laboro. Tiu ĉi ago enkadriĝas kun centoj da agoj, kiuj disvolviĝas tra la tuta Tunizio fare de la *Unuiĝo de Senlaborulaj Gedi-plomatuloj*. Nemri ne estas sola. Multaj junuloj el la urbo kundividas siajn tempon kun li ĉe la policejo, nun aliigita al loko, kie oni aŭskultas muzikon, ludas kartojn kaj parolas pri revolucio.

Ni adiaŭas Thala-n. La patro de Marouan montras al ni la lokon, kie lia filo estis mortigita: “Mi neniam forgesos tiun lokon”. Laŭtas la murskribaĵo, kiun li faris.

La Tunizia popolo ankaŭ ne forgesos lin.

M.H.

[Laborgrupo pri la Afrika Nordo](#) de la Sekretariaro pri Internaciaj Rilatoj de la Hispana ĜKL



“Mi neniam forgesos tiun ĉi lokon”

Secretaría de Relaciones Internacionales de la CGT: *Crónicas desde Túnez (2)*. Rojo y Negro Digital, 8 de abril de 2011.

<http://www.rojoynegro.info/articulo/sin-fronteras/cronicas-tunez-2-el-corazon-tunez-thala-la-comisaria-ocupada>

Esperantigita de Jurgo Alkasaro

